



Esperanto en Danio

16-a jarkolekto • n-ro 5 • novembro 2009



Emblemo de UK 2011

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2010

Enhavo

La modesta homarano.....	3
Tago de paco.....	4
Zamenhof honorita en la pola ambasadejo.....	5
”Kosmos” pri la Esperanto- historio.....	6
Marŝo de paco.....	7
UEA pri Ivo Lapenna.....	9
Leĝpropono pri Esperanto....	11
Næstved.....	12
Paperaj gazeteltondaĵoj.....	13
Kopenhago.....	13
Librorekomendoj.....	15
Nova ĝenerala direktoro de UNESKO.....	17
Mendo de Revuoj por 2010...	18
Scienca artikolo.....	19
Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo.....	27

La modesta homarano

Por nova generacio de esperantistoj povas esti treege utile ekkoni la kulturen heredaĵon de la Movado. Legante pri la historio de la Movado kaj de ĝia kreinto, oni povas nur profunde admiri Zamenhof pro sia modesteco. Unu el la fruaj ekzemploj estas lia respondo al la invitletero de Michaux, la fama organizinto de la unua esperanta kongreso de 1905 en Bulonjo. Unue, en septembro 1904 li skribis modeste al Michaux: "Multe helpi al vi per iaj bonaj konsiloj mi ne povas, ĉar sidante ĉiam dome mi tre malmulte konas la mondon kaj mi neniam ankoraŭ partoprenis en ia kongreso aŭ publika festo". Sed post kelkaj monatoj, kiam li eksciis ke oni planas ceremoniojn honorajn al li, li skribis al Michaux, en marto 1905:



"Mi tre petas Vin, akceptu en la programon de la kongreso nenian punkton, kiu havas iun rilaton al mia persono. Mi tre volas, ke la kongresanoj vidu en mi ne la aŭtoron de Esperanto, sed nur simplan esperantiston... La aŭtoro de Esperanto en la kongreso devas esti rigardata kiel mortinta kaj neekzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la afero. Neniam kaj nenie devas esti elparolata la vorto "majstro" k.t.p... Mi prezidos en la kongreso ne kiel aŭtoro, sed nur kiel 'la plej kompetenta esperantisto'... Nia afero prosperados nur en tia okazo, se ĝi estos ĉiam absolute senpersona".

Per tiaj vortoj eble li pensis ne nur pri la danĝero de ia kulto al li, sed pri la personaj rivalecoj inter la francaj esperantistoj. En la Plena verkaro de Zamenhof eldonita de Ito Kanzi, pli vaste konata kiel Ludovikito, oni

spertas ke Zamenhof planis organizi la esperantistaron pere de sia projekto de Tutmonda Ligo Esperantista kun Centra Komitato kaj deziris ke la projekto estu presata samtempe en la "Revuo" de Michaux kaj en la kongresa libro. Sed la bezono de vere internacia kaj centrigita organizo ankoraŭ ne estis komprenita de ĉiuj esperantistoj kaj la ĵaluzo inter kelkaj el la tiamaj elstaraj francaj esperantistoj dezirantaj estri la movadon prokrastis kaj malebligis la publikigon de la projekto, kaj la organiza projekto de Zamenhof fiaskis. En letero de Michaux 28 jarojn poste oni legas: "la sola ĝojo de Zamenhof estis lia restado en Bulonjo de la 6-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1905. Tiamaniere forpasis 3 jaroj ĝis Hector Hodler sukcese finfine fondis en Ĝenevo Universalan Esperanto Asocion, kaj Zamenhof akceptis la honoran prezidon de UEA.

La unua kongreso estis brilega persona triumfo por Zamenhof kaj verŝajne la plej feliĉaj tagoj en lia vivo. La plej frapaj vortoj de lia parolado estas neforgeseblaj: "... en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio, ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke... ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj."

IS

Tago de paco

Okaze de la tago de paco DEA partoprenis en pacfoiro sabate la 12.9.09 en La Kulturdomo Karens Minde, Valby. Ni havis budon kun diversaj reklamiloj, kaj ni montris kelkajn partojn de la filmo "Esperanto estas..."

La festivalon partoprenis ankau la ambasadoro de Kubo, kiun ni salutis kaj informis ke DEA venontjare partoprenos la UK-n en Havano, prezentante Kopenhagon kiel venontan UK-urbon.

IS

Zamenhof honorita en la pola ambasadejo

La 25a de septembro DEA kaj la Pola Ambasadoro Adam Halamski invitis al akcepto ĉe la pola ambasado, omaĝe al 150a jubileo de Zamenhof kaj la Tago de Lingvoj. La programo post la bonvenigaj vortoj de la Ambasadoro enhavis parladon de Seán O'Riain, la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, muziko fare de Kim Henriksen kaj Stanislaw Mielczarek deklamis la poemon "La Vojo". La aranĝo finiĝis per riĉa bufedo ofertita de la gastiganto.



De maldekstre Stanislaw Mielczarek, la ambasadoro adama Halamski kaj Sean O'Riain

La evento ne povis okazi la 15an de decembro kiu estis nia unua deziro, ĉar en Kopenhago okazos la grava klimata konferenco ĝuste meze de decembro, kaj tiam la ambasado estos tro okupata, do ni trovis alian taŭgan tagon, la Tago de Eŭropaj Lingvoj por festi ambaŭ eventojn.

"Kosmos" pri la Esperanto-historio

En Danio estas malmultaj revuoj en Esperanto, sed unu estas la revuo de Martinus-Instituto "Kosmos", kiu aperas dufoje jare. En 2009 oni celebris 70-jaran jubileon de la uzo de Esperanto en la kadroj de la Instituto. En la reta librovendejo, shop.martinus.dk, oni vendas 17 librojn de Martinus en Esperanto. La lasta numero de Kosmos n-ro 2-2009 ĉefe temas pri movada historio.



Iam en sepdekaj jaroj Ivo Lapenna (1909-1987) estas fotita kun Martinus (1890-1981). De dekstre Martinus, Ivo Lapenna, Birthe Zacho Lapenna kaj Peter Zacho (1911-1991). Ivo Lapenna estis membro de la redakta komitato kaj ĉefa kunlaboranto de la internacia kultura kaj informa revuo Horizonto, kies eldonanto estis Peter Zacho.

La jaro 2009 estas Zamenhofa-jaro kaj ankaŭ la jaro de 100-jara datreveno de Ivo Lapenna. En la nova novembro numero de "Kosmos" Andreas Künzli skribas pri Zamenhofa-jaro kaj antaŭ 50 jaroj, kaj enestas ankaŭ artikolo de Ivo Lapenna pri Zamenhof kaj *la interna ideo*. Betty Chatterjee skribas pri du danaj pioniroj Marie Schrøder (1882-1909) kaj Margrethe Noll (1874-1962), kaj estro de DEA Ileana Schrøder skribas pri la dana pioniro Frederik de Skeel-Gjørling (1876-1910).

Petu senpagan provnumeron de Kosmos ĉe Martinus Instituto, ole@martinus.dk aŭ info@martinus.dk.

Ole Therkelsen

Marŝo de paco



Kiel menciite en nia Novaĵletero DEA partoprenis en la eventoj ligitaj al la monda marŝo por paco kaj neperforto kiu alvenis al Kopenhago la 30-31 de oktobro. La 30a de oktobro posttagmeze okazis konferenco kies tagordo estis propono pri starigo de dana pacministerio kaj pacakademio kaj la spertoj de Kostarika.

La parlamentano de Kostariko Alexander Mora informis pri iliaj spertoj. La lando antaŭ pluraj jaroj decidis malfondi sian armeon, kaj antaŭ nelonge oni sukcesis fondi pacministerion. Tiu ministerio kunlaboras kun la ministerio pri edukado por enkonduki en la lernejoj fakon pri neperforto kaj konfliktoŝolvado. Dum paŭzo mi kontaktis la parlamentanon kaj konstatis ke li neniam aŭdis pri Esperanto, sed post mia enkonduko li reagis tre positive pri nia lingvo.

Vendrede vespere estis organizita lumfesto ĉe la lago Peblinge de kie oni sendis lumlanternojn al la ĉielo, kaj mi estis interviuita de la dana televida kanalo TV2 Lorry pri la kialo de la ĉeesto de nia movado al tiu aranĝo. Mi esplikis ke esperanto estas lingvo de paco, do estas nature por ni partopreni. La mallongan intervjuon oni povas trarigardi ĉe <http://tinyurl.dk/11504>.



La 31an posttagmeze okazis la lasta evento: la marŝo de la Parlamento al la Urbodomo Placo kun partopreno de 15 el niaj membroj, cetere tre videblaj pro la kunportataj flagoj. Antaŭ la komenco de la marŝo parolis la ambasadoro de Bolivio kaj aliaj eksterlandaj delegitoj de la marŝo kiuj kunvojaĝas ĝis la fino de la marŝo en Argentino la 2a de januaro 2010.



UEA pri Ivo Lapenna

Mesaĝo de Probal Dasgupta, prezidanto de UEA

Prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987), kies centjariĝon ni festas la 5-an de novembro en 2009, estis sendube la plej elstara inter la gvidantoj en la organizita Esperantomovado. Oni ofte ligas lian esperantistan karieron specife kun Universala Esperanto-Asocio, kiun li gvidis en ties modernan institucion formon. Sed lia kontribuo al la Movado superverŝas la limojn de tiu institucia identeco.

Lapenna estis la plej elstara oratoro en la historio de la lingvo. Lia verko "Retoriko", kiu instruas la arton de parola persvadado, vicas inter la klasikaĵoj pri tiu temo en iu ajn lingvo. Liaj paroladoj restas modeloj ofte aŭskultataj de sinsekvaj generacioj. La sukceso de lia retoriko en Montevideo en 1954 estis venko ne nur por UEA, kiun li tie reprezentis, sed ankaŭ por la parola persvadado, la sola akceptebla batalilo en serioza batalado por la paco. Li multe laboris ne nur por akceptigi kaj fortikigi la demokratian metodaron, sed ankaŭ specife por pliakrigi la retorikon kaj plivastigi la kapablon de publikaj agantoj efike uzi ĝin. Multaj el ni ne memoras, ke li ankaŭ fake okupiĝis pri la

evoluigo de nia lingvo: en la Simpozio pri ata/ita, libroforme organizita de la eldonejo Stafeto, gramatikistis kun aliaj gramatikistoj ankaŭ Ivo Lapenna, tute kapable kaj senlute.

Tamen kompreneble li specife apartenis al tute alia fakoj: li estis grava fakulo pri la internacia juro, kaj ĝuste surbaze de tiu sia fakokono li muldis la postmilitan laborlinion de UEA. Lia sinengaĝo sur la tereno de la homaj rajtoj kreis apartan profilon ne nur por UEA, sed ĝenerale por la Esperantomovado de post la dua mondmilito. Pro liaj klopodoj UEA jam ekde 1947 – unu jaron antaŭ la formala adoptiĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en Unuiĝintaj Nacioj – enstatutigis la principon, ke la respektado al homaj rajtoj UEA rigardas kiel nepran antaŭkondiĉon por siaj laboroj.

Al la hodiaŭa generacio devus esti grave, ke li estis inter la unuaj, kiuj en la batalo por konservi la malfortajn lingvojn kaj kulturojn emfasis la koncepton de lingva genocido kiel juran batalilon. El la perspektivo de la juro li prezentis analizon de la lingva geopolitiko kaj bazis sur tio la pledadon por Esperanto kiel justa solvo. La principoj de tiu analizo akiras pli ĝenerale agnoskatan gravecon hodiaŭ, kiam

multaj komentantoj iom post iom agnoskas la valoron de moralaj (anstataŭ nur de pragmatikaj) konsideroj en la agado sur la monda scenejo, kaj kiam la voĉoj de la ne-registaraj organizaĵoj kiel portantoj de tiuj moralaj valoroj – foje opozicie al la foje senmoralaj ŝtataj sistemoj – plifortiĝas en la internaciaj institucioj.

Mi ne volas en tiel grava jubilea momento paroli ĉefe pri la UEA-kariero de figuro, kiu tiel elstare skulptis tutan ĉielpejzaĝon por la lingvanaro kiel tuto: tro mallarĝe limigi lin al nia asocio donus la impreson, ke ni volus iel ŝteli lian vizaĝon por ni! De LPLP (kiu en lia tempo havis la pranomon "La Monda Lingvo-Problemo") ĝis la serio Oriento-Okcidento, de la dumkongresa oratora konkurso ĝis la roterdama oficejo de UEA, tiom da institucioj de nia asocio atestas lian ĉarpentistan lerton, ke ni prefere ne eku pri tiu temo, sed lasu al la tuta esperantista publiko, sen-diskriminacie pri asocia aparteno, aplaŭdi la memoron de tiu homo, kiu donis al ni plej da kialoj por aplaŭdi! Li estis unu el tiuj mal-multegaj, pri kiuj eblas tute sincere kanti: "La mond' aliĝos, la temp' pasos for/ sed vivos eterne pri ili memor'."

Poŝtmarkoj pri Zamenhof kaj Lapenna

Por omaĝi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna, UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la portreto de sia eksprezidanto. La nova marko estas lanĉita en la naskiĝtago de Lapenna, la 5-an de novembro, kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por letero ĝis 20-grama en Nederlando.

La poŝtmarko estas vendata en folioj kun 10 markoj, mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas EUR 5,50 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La eldonkvanto de la marko estas limigita kaj post la elĉerpiĝo ĝi ne estos represita. Sekve ĝi rapide fariĝos dezirata objekto ankaŭ ĉe nesperantistaj kolektantoj same kiel la poŝtmarkoj lanĉitaj en 2008 okaze de la 93-a UK en Roterdamo kaj la 100-jariĝo de UEA.

Ĉi-jare aperos ankoraŭ dua poŝtmarko, kiu omaĝos la 150-an naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof. Ĝi estos lanĉita en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28-an de novembro, sed antaŭmendoj estas jam akceptataj. Ankaŭ la Zamenhof-marko aperos en 10-markaj folioj kaj ĝiaj vendokondiĉoj estos samaj kiel tiuj de la Lapenna-poŝtmarko.

[Ret-Info]

Leĝpropono pri Esperanto

Okazas nuntempe en Brazilo klopodoj por efektiviĝi Leĝpropono pri instruado de Esperanto. Lastminute atingis nin jenaj informoj:

Post aprobigo en la brazila Senato, la leĝpropono de senatano Cristovam Buarque pri lauelekta instruado de Esperanto en mezlernejoj pluiris al la Deputita Chambro. Nun ties komisiono pri edukado kaj kulturo (CEC- Comissão de Educação e Cultura) analizos la aferon, sub la kodo PL 6162/2009 (Leghoprojekto). Oni povas legi pri ĝi en la portugala:

http://www.camara.gov.br/sileg/Prop_Detalhe.asp?id=454210

Estas jam nomumita raportisto, deputito Neilton Mulim (PR/RJ) laŭ profesie instruisto pri matematiko kaj psikopedagogo, iama urba konsilanto en São Gonçalo-RJ, kies biografion (en la portugala) oni legas ĉe:

<http://www2.camara.gov.br/internet/deputados/biodeputado/index.html?nome=NEILTON+MULIM&leg=53>

Lia retadreso estas:

dep.neiltonmulim@camara.gov.br

Sed jam ĉiuj komisionanoj rajtas fari amendojn al la projekto. Ili estas

<http://www2.camara.gov.br/comissoes/cec/membros>

Prezidas la komisionon profesorino Maria do Rosário (PT/RS):

dep.mariadorosario@camara.gov.br

Se oni alskribos almenaŭ la prezidantinon kaj la raportiston, amase kiel oni faris rilate al la senatanoj, tio estos granda helpo al la afero. Al alilingvanoj, mi ripetas: sendi mesaghon nur en via nacia lingvo kun videbla vorto "Esperanto" en latina alfabeto en la titollinio estas sufiĉa kontribuo.

Amike dankas

James Rezende Piton

UEA-Ĉefdelegito en Brazilo

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111 (krom la du prelegoj 08.01. kaj 12.02., kiuj okazos en 219).

Okazos:

Ve 20.11 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj + traduka laboro

Ve 04.12 je h 19.30: Danlingva prelego pri genealogio

Ve 11.12 je h 13.00: Jul-aranĝo (lunĉo kaj ujutno)

2010

Ve 08.01 je h 19.30: Danlingva prelego pri la sorto de maljunuloj de alia etna origino

Ve 15.01 je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo.

Ve 29.01 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj + traduka laboro

Ve 12.02 je h 19.30: Danlingva prelego pri vizito en Irlando

Ve 19.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN

Ve 26.02 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj + traduklaboro

Ve 05.03 je h 19.30: Danlingva prelego pri konstelacioj

Ve 12.03 je h 19.30: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj + traduklaboro

Ve 19.03 je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ve 26.03 je h 19.30: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj + traduklaboro

Ve 09.04 je h 19.30: Sezonfino kun ujutno kaj io por la stomako

NB. Se la traduklaboro postulas pli da vendredaj kunvenoj ol supre menciite, la koncernaj kunlaborantoj ricevos informon.

Okazis:

02.10: Antaŭa trajnestro Gunnar Langelykke rakontis kaj montris fotojn de ŝipa ekskurso al Antarktio. Venis spektantoj de ekster nia rondo.

16.10 kaj 30.10: La legolibro Faktoj kaj Fantazioj okupis niajn cerbojn.

06.11: Hans Jørgen Kristensen rakontis pri unu el siaj multaj vojaĝoj, ĉifoje pri Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Kiel kutime tiaj aranĝoj altiras 'eksterulojn'.

Paperaj gazeteltondaĵoj

Septembro 2009

Jernbanefritid pri la IFEF-kongreso en Trieste, Italio.

Prelego de Gunnar Langelykke en Næstved menciita trifoje en lokaj komunikiloj kaj en Berlingske Tidende.

Frederiksborg Amts Avis pri 105-jara Estrid Geertsen kaj ŝia rilato al Esperanto.

Oktobro 2009

Jernbanefritid pri KEF en Helsingør en julio.

2 krucvortenigmoj en resp. Hjemmet kaj Fyens Stiftstidende mencias Esperanton.

Relative magra rezulto, do daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Kopenhago

Okazis:

En aŭgusto post UK vizitis nin Atilio Orellana Rojas por okazigi semajnfinan kurson en nia domo en Kopenhago. Dum du tagoj, de 15.30 ĝis 17.30, li vigle kaj atentokapte instruis dekkvinon de niaj membroj. Atilio estas unu el la famaj Cseh-instruistoj, kaj dum periodo estis direktoro de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Li originas el Argentino, sed jam multajn jarojn loĝas en Nederlando.



Okazos:

- 09.11.2009 Traduka vespero.
- 16.11.2009 Distra vespero. Ni Esperante distru unu la alian ekzemple per ŝerco, kanto, deklamo de poemo, kvizeto aŭ io tute alia.
- 23.11.2009 Studgrupo.
- 30.11.2009 Prelego de Birthe Lapenna: La vivo kaj la agado de Ivo Lapenna.
- 07.12.2009 Tago antaŭ la tago de la libro. Arne Casper havas heredaĵon da aĉetebraj libroj el la Vejle E-klubo, kiujn oni povos aĉeti aŭkcie. Ankaŭ aliaj aĵoj estos vendataj. Venu aĉeti kristnaskajn donacaĵojn, ĉu ne?
- 14.12.2009 Ni kristnaskofestos.
- 04.01.2010 Feliĉan novan jaron! Ni distru unu la alian per ia amuza kaj interesa agadeto kiu ekzemple estos kanto, kvizeto, poemdeklamo, informeto, ŝerco aŭ io tute alia.
- 11.01.2010 Prelegeta vespero. Ni mallonge parolu pri iu dana temo. Dana gzstronomio, la marvirineto. Ĉu vere danoj estas la plej feliĉaj homoj en la tuta mondo? Ktp.
- 18.01.2001 Ole Therkelsen prezentos sian novan danlingvan libron eldonitan la 21-an de septembro 2009: Martinus og den nye verdensmoral.
- 25.01.2010 Studgrupo.
- 01.02.2010 Ni rakontu pri libro legita.
- 08.02.2010 Kantvespero.
- 15.02.2010 Jarkunveno de KEK
- 22.02.2010 La tago de la Gepatra Lingvo estos la 21a de februaro, kaj la semajno de internacia amikeco estas la lasta semajno de februaro.
- 01.03.2010 Regin Larsen prelegos pri la junulara agado.
- 08.03.2010 Henning kaj Karen nin distros per numerludo.

Libro rekomendoj

La Vivo de Andreo Cseh

Eklegante la tricentan verkon de Ed Borsboom pri Andreo Cseh, oni demandas sin ĉu vere eblas skribi tiel multe pri unu viro.

Tamen eblas!

Eminenta verko pri nekredebla idealisto, el periodo de la eŭropa historio kiu estis plena de mankoj kaj militoj.

Komencante malproksime en la orienta Eŭropo, en la lima regiono inter Hungario kaj Rumanio, ni sekvas lian batalon por nia lingvo, lian amikecon kun la familio Julia kaj Jan Isbrücker kaj lian translokiĝon al Nederlando, – amikeco kiu sukcesis kun la kreado de la instituto en Hago, Internacia Esperanto-Instituto IEI en 1930 – instituto kiu ekzistas ankoraŭ hodiaŭ.

Andreo estis eminenta pedagogo, kiu kreis la metodon, kiun ni hodiaŭ konas kiel la Ĉe-metodo (aŭ Cseh-metodo) – kaj miloj da homoj spertis nian lingvon pere de lia granda laboro kaj eterna entuziasmo.

Bedaŭrinde kreis lian grandan sukceson ankaŭ multe da envio kaj periodoj da malakordo inter UEA kaj IEI. Malgraŭ tio kaj la kontraŭago de tiaj personoj, lia vivo estis elstara ekzemplo por ĉiu esperantisto.

Bela kaj varma libro pri granda homo kaj lumanta reprezentanto de Nia Lingvo.

Arne Casper

Informado praktike

Mi povas rekomendi al vi legi kaj posedi ĉi tiun libron.

”La verko estas manlibro por ĉiuj, kiuj volas informadi pri Esperanto. Verki informilon, deĵori en standoj, krei retpaĝon, kolekti monon ... La emfazo estas je la praktika flanko. Sed necesas ankaŭ kompreni la funkcionmanieron de ĵurnalistoj, kiuj estas niaj plej gravaj – kredu aŭ ne – partneroj en informado” (el retbutiko ĉe FEL, eldoninto).

Ni ĉiuj, ne nur la aktivuloj, povas profiti el tiu libro. – Tre diversajn temojn la enhav-listo prezentas. Ĝia strukturo donas bonan superrigardon, taŭga



por manlibro. Kelkaj el la situacioj estas priskribitaj per epizodoj. En la ĉapitro "Oftaj demandoj de ĵurnalistoj" estas listigitaj demandoj, jen ekzemplo: Kiom da homoj parolas Esperanton? Estas propono por respondi kaj klarigo al tio.

"La plej grandan parton mi verkis jam en 2002, kaj dum la pasintaj jaroj mi pliampleksigis kaj poluris la tekston. / Ziko van Dijk, sept. 2006"

Ziko van Dijk estas historiisto kaj okupiĝas interalie pri la historio de UEA. Jen aliaj de liaj verkoj: "Esperanto sen mitoj", "Sed homoj kun homoj", "VIKIPEDIO por vi" kaj "La Asocio".

Jytte Sunekær

Legenda libro

"La frakseno Igdrasil. Antikva dia historio" de Alf Henrikson kaj Edward Lindahl. Tradukita en Esperanto de Bertil Nilsson, Eldona Societo Esperanto 2005.

Mi rekomendas ĉi tiun libron. Ĝi rerakontas la nordian azan historion kun amuzaj desegnaĵoj kaj la teksto estas skribita tiel ke la azoj preskaŭ 'vivas', en nova moderna lingvo. Estas libro por daŭrigantoj/progresantoj, kaj aĉetebla ĉe Libroservo.

Tara Gregers


Solstico

*Nun regas la temp' malhela
kun pluvo kaj tagoj frostaj,
sed venos printemp' sunplena,
alternas solsticoj vintraj.*

TG

Nova ĝenerala direktoro de UNESKO

La prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, gratulis la novan ĝeneralan direktoron de Unesko, la bulgaran ambasadorinon Irina Bokova, tuj post ŝia elekto fare de la Ĝenerala Konferenco de la organizaĵo la 15-an de oktobro.



“Ni estas malnovaj amikoj”, skribis prof. Dasgupta en sia mesaĝo. Li klarigis, ke jam en 1954 Unesko starigis konsultajn rilatojn kun UEA kaj samjare en Montevideo ĝia Ĝenerala Konferenco akceptis rezolucion favoran al Esperanto. "Sojle de la centjariĝo de Esperanto, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis en Sofio en 1985 duan rezolucion, kiu ebligis al ni pli proksiman kunlaboron kun Unesko en la rapide ŝanĝiĝanta tutmonda kunteksto", Dasgupta aldonis altirante la atenton de Bokova al la speciala loko de la bulgara ĉefurbo en la historio de la rilato inter la du mondaj organizaĵoj. "Nia komuna interesiĝo pri la konservado de lingva kaj kultura diverseco kaj pri la kreado de leĝaj formoj al la ideo de lingvaj homaj rajtoj, faras el tio ĉi gravan rilaton aĉ" malmultaj NRO-j estas aktivaj en tiu ĉi kampo", skribis Dasgupta, finante per la certigo de UEA daŭre kunlabori kun Unesko pri komunaj temoj.

Irina Bokova estos investita en sia nova posteno la 23-an de oktobro kiel la unua virino en la historio de Unesko. “En mia laboro gvidos min mia koncepto pri nova humanismo por la 21-a jarcento”, ŝi kristaligis sian mision tuj post la elekto.

[Gaz Kom UEA 343]

Ĝis dimanĉo la 6a de decembro eblas aliĝi al la lasta aranĝo de la Kopenhaga Esperanto-Kultura Grupo:

Granda jubilea vespero

**okaze de la 150a naskiĝdatreveno de L.L.Zamenhof
sabate la 12-an de decembro inter la horoj 19.00 – 23.00.**

Prezo 70 kr. (inkluzive manĝon).

Aliĝu ĉe Torben Svendsen, tel. 3874 97 64,

kulturgrupo@webspeed.dk

Mendo de Revuoj por 2010

La jarfino alproksimiĝas kaj nun estas tempo por mendi revuojn.

Bv pagi rekte al nia konto reg 3627, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj ankaŭ memorante ke la limdato por enpago estos

la 1-a de decembro 2009

– poste ne eblos transigi la sumon ĝis post la 31-a de decembro.

Kodo	Nomo	abonprezo DKK
OdE	Ondo de Esperanto	285.-
LE	La Espero	170.-
RE	Revuo Esperanto	285.-
NV	Naturista Vivo	120.-
LJ	La Jaro	41.-
JA	Juna Amiko	110.-
Mon	Monato	366.-
BA	Beletra Almanako	255.- 3 numeroj en 2010
FE	Femina	180.-
LF	Literatura Foiro	275.-

Antaŭdankon kaj amikajn salutojn

Arne Casper

Scienca artikolo

(origine aperis en Hungara Revuo, NHI oktobro).

“MI NOMBRAS KAJ VI KAŜAS VIN”: INTERPAROLADO INTER INFANOJ KAJ BESTOJ KIEL FAKTORO DE LINGVO-EVOLUO¹.

Renato Corsetti ², Gianluca Panella ³

1. Enkonduko

Ĉi tiu artikolo alfrontas kampon ankoraŭ malmulte esploritan en la studoj pri la lingvo-akirado en infaneco: la kontribuo de la dom-bestoj je la parolkapablo de infanoj.

Estas konataj la rilatoj de intimeco kaj de granda am-sento, kiuj ekestas inter infanoj kaj bestoj, jam en aĝo antaŭa je la produktado de la unuaj vortoj. La kuracadoj (terapioj) helpe de dom-bestoj (AAT – laŭ la angla lingva mallongigo), kiuj estas konataj sub la anglalingva ŝildo *Pet Therapy*⁴ (eble en la internacia lingvo: *Kuracado per dorlot-bestoj*), nuntempe celas al plena sanigo en individuoj kun malsamspecaj malsanoj (aŭtismo, multobla handikapo, et-vidantoj kaj ne-vidantoj, malsanuloj laŭ la dovna sindromo, epilepsiuloj, homoj kun problemoj de angoro kaj de streĉo, kormalsanuloj, malsanuloj pro la malsanoj de Parkinson kaj Alzheimer, ktp.). Aliflanke nuntempe ne ekzistas kurac-proceduro celanta nur la

1 Ĉi tiu artikolo, jam aperigita aliforme en Scienco kaj Kulturo, baziĝas sur esploro farita por studfina disertacio diskutita en la Fakultato Psikologio 1, Universitato de Romo “La Sapienza”, en julio 2004-a, kies referanto estis profesorino Traute Taeschner. La frazo “Mi nombras kaj vi kaŝas vin” (en la itala originalo “Io conto e te ti nascondi!”) estas unu el la frazoj surbendigitasj dum la esploro. Ĝi estis dirita de infano al sia dombersto. Ĝi rilatas al difinita maniero ludi kaŝludon en Italujo.

2 Renato Corsetti, profesoro en la Fakultato Psikologio 1, Universitato de Romo “La Sapienza”, zorgis pri la projekto de la esplor-laboro kaj, parte, pri la redaktado de ci tiu artikolo.

3 Gianluca Panella finis siajn studojn pri psikologio de evoluo kaj de edukado en la Fakultato Psikologio 1, Universitato de Romo “La Sapienza”, en julio 2004-a. Li zorgis pri la projektado de la esploro, pri la kolektado de la datumoj kaj pri la posta analizado.

4 Ne ekzistas en la itala esprimo samsignifa sufiĉe staila por *Pet Therapy*. Pluraj proponoj aperis dum la lastaj jaroj: *terapia dolce con gli animali*, *terapia con gli animali domestici*, *cuccioloterapia*, ktp. Vidu ern Giovanardi e Gualdo (2003: 228). En Esperanto *Kuracado per dorlot-bestoj* estas plena redono de la senco.

reakiron de parol-kapablo ĉe la pacientoj de ĉi tiuj kuracadoj. Ĉar la kuracado pere de bestoj donas avantaĝojn al difinita speco de malsanularo, ni demandis nin ĉu la ĉeesto de instiga faktoro, kia estas la besto en la vivo de sanaj infanoj, ne povus faciligi ilian evoluon en la kampo de lingvaj kapabloj.

Ni volis, do, esplori, kiom la ĉeesto de ĉi tiu “interparolanto” ŝatata de infanoj instigas ilin voli komuniki pli multe kaj sekve kia estas la fina rezulto de ĉi tiu pli granda komunikado rilate al la evoluo de la parol-kapablo.

La kolektitaj informoj, rilatantaj ĉefe al la speco de frazoj elparolataj de la infanoj, montras pozitivan efikon je la direkto de la evoluo de la kapablo produkti frazojn laŭgrade pli komplikajn, kiel ni vidos pli detale poste.

2. Mallongaj rimarkoj pri la lingva evoluo de infanoj.

Dum la lastaj jardekoj ni vidis la ŝanĝiĝon de la ĉefaj idear-kernoj kaj sekve de la teorioj pri la lingvo-akirado fare de infanoj. Ni opinias, ke la nuna aliro estas difinebla kiel “kunmeta”. Ĝi estas la aliro, kiu konsideras kaj la kapablojn specifajn de la homaro, kaj la antaŭkondiĉojn de la evoluo de la korpaj organoj kaj de la ĝeneralaj kon-kapabloj kaj la esencan kontribuon de la medio, kaj ankaŭ la same esencan kontribuon de la lernanta infano, kaj ĝi povas kontribui antaŭenigi la studojn en ĉi tiu sektoro pli ol povis la antaŭaj teorioj, kiuj emis emfazi la gravecon de nur unu faktoro (komparu Corsetti, 2003).

La lingvo-akirado ĉe infanoj aperas kiel la sinsekvado de serio de fazoj, kiuj sekvas unu la alian en difinita ordo, sama por multaj infanoj. Samtempe ĉi tiu procedo prezentas multenombrajn individuajn variaĵojn, kiuj rilatas ne nur al la tempoj sed ankaŭ al la manieroj kaj al la strategioj de lernado. Ĉio ĉi tio estas bone konata kaj ne postulas pliajn observojn en ĉi tiu artikolo. Ni nur diru, ke la studantoj de ĉi tiu kampo eltrovis serion de fazoj aŭ etapoj tiel nomataj “universalaj” de lingvo-akirado, kiuj ŝajnas troveblaj en ĉiuj infanoj, sendepende de la lingvo, kiun ili aŭdas kaj kiun ili estas lernantaj. Aliflanke ni ne povas ne aludi je la komparaj studoj pri la akirado de malsamaj lingvoj (“crosslinguistic” en la angla), kiuj laŭ la aŭtoroj de ĉi tiu artikolo produktis multajn rezultojn. La unuaj studoj en ĉi tiu kampo estis tiuj de Slobin (1985). Ĉi tiuj studoj montras la mal-samecojn inter la serio de akirad-fazoj depende de la funkciad-ecoj de la koncerna lingvo. Esence la lingvaĵoj pli oftaj kaj pli regulaj estas lernataj

unue, sed ili ne estas la samaj en malsamaj lingvoj.

Ĉirkaŭ la aĝo de 24 monatoj (senkonsidere de individuaj malsamecoj) ĝenerale infanoj ekkunmetas vortojn en frazojn. Ĉi tio estas, laŭ la opinio de la studentoj de infana lingvo-evoluo, fundamenta fakto. Tamen la kapablo kombini simbolojn estas tre mallarĝe kunligita al la kvanto da vortoj jam posedataj: cent vortoj ŝajnas esti “minimuma sojlo” por transiri al frazoj. Sed, pro la individuaj malsamecoj, ne ekzistas tute fiksita minimuma nombro da vortoj por difini la kombin-kapablon de infanoj kaj krome gravas substreki la akirad-stilon de la unuopa infano, kiu povas esti tuteca aŭ analiza⁵.

Ĉirkaŭ la aĝo de tri jaroj infanoj konstruas ĝuste simplajn kaj asertajn frazojn, kaj en ĉi tiu sama periodo infanoj ekuzas en la itala la pronomojn io, tu, egli. Ili, do, eniras rilaton kun la interparolanto (Francescato, 1970).

Parisi (1977) asertas, ke frazaj strukturoj estas akirataj de infanoj je la sama aĝo sendepende de la soci-kultura medio, en kiu ili kreskas. Ĝenerale la meznombra longeco de la frazoj produktataj de infano estas konsiderata unu el la plej gravaj kaj fidindaj indikiloj de lia aŭ ŝia lingva evoluo. Praktike Ĉirkaŭ la aĝo de tri-kvar jaroj multaj infanoj posedas la strukturojn substantajn ĉiujn frazojn de difinita lingvo kaj la malsameco rilate al plenkreskuloj eventuale videblas en la uzo-ofteco de ĉi tiuj strukturoj.

3. La esploro

La esploro estis farata sur specimeno de 36 infanoj, sanaj, ĉiuj ununuraj infanoj, loĝantaj en la provinco Romo, elektitaj surbaze de la faktoroj: sekso, aĝo kaj soci-kultura nivelo.

La eksperimenta grupo konsistas el 18 infanoj, kiuj posedas dom-bestojn (hundoj, katoj, hamstroj, kunikloj, anseroj, kokinoj, birdoj, ktp.) kaj la kontrol-grupo el 18 infanoj sen bestoj en la domo.

La eksperimenta grupo estis dividita en 3 subgrupojn: la unua enhavas 6

5 La *tutecaj* infanoj per vorto-kvanto foje malalta povas produkti parol-unuojn de pluraj vortoj, kiuj tamen ĝenerale konsistas el “kliŝaj frazoj”, (ekzemple. *Va via, Ecco mamma*), kiuj ŝajnas reproduktajoj de frazoj komplete parkerigitaj pli ol frazoj anlizitaj en la konsistigaj partoj. Male infanoj, kiujn oni difinas *analizaj*, komencas kunemti frazojn, kiam ilia vort-provizio tendence estas nombre pli granda. La frazoj estas malpli rigidaj, pli produktopovaj, kaj konsistantaj el vortoj jam antaŭe anlizitaj kiel “unuopja” vortoj kun tiu komunika kaj informa riĉeco antaŭe priskribita kiel kapablo rilatigi partojn d ela realo (Caselli, Casadio, 1995: 27).

infanojn, el kiuj 3 estas viraj kaj 3 inaj en aĝo varianta inter 2 jaroj kaj 6 monatoj kaj 3 jaroj (meznombra aĝo: 2 jaroj kaj 10 monatoj), la dua grupo enhavas 6 infanojn, el kiuj 3 estas viraj kaj 3 inaj en aĝo varianta inter 3 jaroj kaj 4 jaroj (meznombra aĝo: 3 jaroj kaj 5 monatoj), kaj la tria grupo enhavas 6 infanojn, el kiuj 3 estas viraj kaj 3 inaj en aĝo varianta inter 4 jaroj kaj 4 jaroj kaj 6 jaroj (meznombra aĝo: 4 jaroj kaj 2 monatoj). Krome ĉiu eksperimenta grupo estas dividita en 2 infanoj (1 vira kaj 1 ina) de soci-ekonomia nivelo malalta (B), 2 de meza nivelo (M) kaj du de alta nivelo (A).

La kontrol-grupo estis kunmetita kun precize la samaj ecoj de la eksperimenta grupo.

En la sekvantaj tabeloj oni havas la ecojn de la 18 infanoj de la eksperimenta grupo (sekso, aĝo kaj soci-ekonomia nivelo: alta, meza, malalta) por ĉiu sub-grupo.

En la 1-a tabelo estas la ecoj de la 6 infanoj de la 1-a grupo.

Tabelo 1.

Infanoj	Sekso	Aĝo	Soci-kultura nivelo
1	V	2;11,28	A
2	V	2;8,12	M
3	V	2;7,1	B
4	I	2;4,13	A
5	I	2;11,20	M
6	I	2;10,5	B

En la 2-a tabelo estas la ecoj de la 6 infanoj de la 2-a grupo.

Tabelo 2

Infanoj	Sekso	Aĝo	Soci-kultura nivelo
7	V	3;7,23	A
8	V	3;4,6	M
9	V	3;5,26	B
10	I	3;6,2	A
11	I	3;4,15	M
12	I	3;5,22	B

En la 3-a tabelo estas la ecoj de la 6 infanoj de la 3-a grupo.

Tabelo 3.

Infanoj	Sekso	Aĝo	Soci-kultura nivelo
13	V	4;2,23	A
14	V	4;0,4	M
15	V	4;0,20	B
16	I	4;1,8	A
17	I	4;1,25	M
18	I	4;3,10	B

La kolektado de la informoj estis farata en la ĉi-sekva maniero: oni renkontis la infanoj unuope dum po 45 minutoj. Dum tiu periodo estis farita surbendigo de la spontana parolado de la infano produktita en interago kun la esploristo kaj la dom-besto (ĉi tiu ĉeestis, kompreneble, nur en la kazo de la eksperimenta grupo).

Poste estis transskribitaj la surbendigoj kaj oni enklasigis la parol-unuojn (ĝenerale laŭ la kategorioj de Taeschner, Volterra, 1986, kun kelkaj adaptoj. Vidu ankaŭ Corsetti, 2004). Nia klasigo antaŭvidas la jenajn unuojn: unuopaj vortoj (PS), sintagmoj (SIN), unukernaj frazoj kompletaj kaj nekompletaj (FNC; FNI), vastigitaj frazoj kun modifilo aŭ adverbo aŭ

nekompletaj (FACA; FACM; FAI), kompleksaj frazoj kun enmetitaj elementoj implicaj kaj malimplicaj, kun relativaj esprimoj kaj nekompletaj (FCII; FCIE; FCR; FCI), dukrenaj frazoj subordigitaj, kunordigitaj kaj nekompletaj (FBS; FBC; FBI).

Por ĉiu infano estis redaktata analiz-slipoj kun la oftecoj kaj la grafikaĵoj rilatanta al la fraz-distribuo, la meznombra ofteco de ĉiu grupo kaj fine la komparo inter la meznombraj oftecoj inter la unuopaj infanoj, kio permesis veni al la konkludoj, kiuj konfirmis la komencan hipotezon, tio estas ke la ĉeesto de dom-besto influas pozitive la lingvan evoluon (mezuritan pere de la fraz-strukturo) de la infanoj en la unuopaj aĝ-grupoj.

Sekvas nun la tabeloj, kiuj resumas la komparojn inter la **meznombraj oftecoj** en ĉiu grupo **eksperimenta (GS)** kaj **kontrola (GC)**.

Tabelo 4.

Gr/Tf	Ps	Sin	Fni	Fnc	Fai	Faca	Facm	Fci	Fcii	Fcie	Fcr	Fbi	Fbc	Fbs
G1S	9	12	10	26	9	4	4	12	4	4	4	13	11	10
G1C	18	23	19	16	8	3	3	6	3	3	2	5	4	4

Gr = Grupoj Tf = Speco de la frazoj

Tabelo 5.

Gr/Tf	Ps	Sin	Fni	Fnc	Fai	Faca	Facm	Fci	Fcii	Fcie	Fcr	Fbi	Fbc	Fbs
G2S	13	17	16	23	19	4	7	16	5	5	4	17	11	7
G2C	18	20	13	17	18	5	4	13	4	3	3	11	5	5

Gr = Grupoj Tf = Speco de la frazoj

Tabelo 6.

Gr/Tf	Ps	Sin	Fni	Fnc	Fai	Faca	Facm	Fci	Fcii	Fcie	Fcr	Fbi	Fbc	Fbs
G3S	12	10	8	21	10	6	7	10	6	5	6	11	14	12
G3C	19	15	15	15	10	4	4	9	5	3	5	9	8	8

Gr = Grupoj Tf = Speco de la frazoj

Observinte, ke la ĉeesto de dom-bestoj influas pozitive la lingvo-evoluon en ĉiuj tri grupoj, ni volis vidi en kiu el la grupoj ĉi tiu ĉeesto havas plej grandan efikon.

La faritaj komparoj evidentigas malsamecon inter la grupoj:

la unua eksperimenta grupo (meznombrata aĝo: 2 jaroj kaj 10 monatoj) montras malsamecon de la meznombraj oftecoj rilate al la kontrolgrupo pli grandan rilate al la dua kaj tria grupo. La dua eksperimenta grupo (meznombrata aĝo 3 jaroj kaj 5 monatoj) montras malsamecon inter la meznombraj oftecoj rilate al la kontrol-grupo similan al tiu montrita de la tria grupo (meznombrata aĝo: 4 jaroj kaj 2 monatoj).

La ĉeesto de la dom-berto, do, influas plej multe la lingvan evoluon ĉe la infanoj de la unua eksperimenta grupo, la plej junaj. Sekvas nun la resuma tableo de la **malsamecoj** inter la meznombraj oftecoj de la grupoj eksperimenta kaj kontrola.

Tabelo 7.

Dg/Tf	Ps	Sin	Fni	Fnc	Fai	Faca	Facm	Fci	Fcii	Fcie	Fcr	Fbi	Fbc	Fbs
G1S -G1C	-9	-11	-9	10	1	1	1	6	1	1	2	8	7	6
G2S -G2C	-5	-3	3	6	1	-1	3	3	1	2	1	4	6	2
G3S -G3C	-7	-5	-7	6	0	2	3	1	1	2	1	2	6	4

Dg = Malsamecoj inter la grupoj Tf = Fras-tipoj

4. Diskuto pri la rezultoj kaj konkludoj

Surbaze de la farita analizo de la fraz-strukturo de la grupoj eksperimenta kaj kontrola evidentiĝas, ke la eksperimenta grupo (kun ĉeesto de dom-besto) en ĉiuj aĝ-grupoj konsideritaj produktis pli grandan nombron da frazoj pli komplete formulitaj (kompletaj unukernaj frazoj, kompleksaj kaj dukernaj frazoj) rilate al la kontrol-grupo (malĉeesto de dom-besto).

La ĉeesto de la dom-besto influis pozitive je la strukturigo de la frazoj

produktitaj dum la son-surbendigado. La kontrol-grupo prezentas pli grandajn valorojn de meznombraj oftecoj rilate al la unuopaj vortoj, la sintagmoj kaj la nekompletaj unukernaj frazoj en la 1-a grupo (meznombra aĝo: 2 jaroj kaj 10 monatoj), la unuopaj vortoj, la sintagmoj kaj la vastigitaj frazoj kun adverboj en la 2-a grupo (meznombra aĝo: 3 jaroj kaj 5 monatoj) kaj unuopaj vortoj, sintagmoj kaj nekompletaj unukernaj frazoj en la 3-a grupo (meznombra aĝo: 4 jaroj kaj 2 monatoj). Esence, do, la kontrol-grupo produktas pli da unuopaj vortoj aŭ da sintagmoj kaj malpli da pli komplikaj fraz-strukturoj.

Krome la faritaj komparoj evidentigas malsaman konduton inter la grupoj: la unua eksperimenta grupo (meznombra aĝo: 2 jaroj kaj 10 monatoj) evidentigas malsamecon inter la meznombraj oftecoj rilate al la kontrol-grupo pli grandan ol la diferencoj prezentataj de la dua kaj tria grupoj. La dua grupo (meznombra aĝo: 3 jaroj kaj 5 monatoj) montras malsamecon inter la meznombraj oftecoj rilate al la kontrolgrupo similan je tiu de la tria grupo (meznombra aĝo: 4 aroj kaj 2 monatoj).

Do, la ĉeesto de la dom-besto ŝajnas influi plej multe la lingvan evoluon de la plej malgrandaj infanoj, kiuj havas aĝon inter 2 jaroj kaj 6 monatoj kaj 3 jaroj (meznombra aĝo: 2 jaroj kaj 10 monatoj), verŝajne pro pli granda intenseco de la rilato kaj de la komunikado kun la besto rilate al la interagado kun aliaj membroj de la familio aŭ kun eksteruloj.

BIBLIOGRAFIO

- Antinucci, F. (1970), *Le strutture della sintassi*, Bari: Laterza
- Camaioni, L. (2001), *Psicologia dello sviluppo del linguaggio*, Bologna: Il mulino
- Caselli, M.C. , Casadio, P. (1995), *Il primo vocabolario del bambino*, Milano: Franco Angeli Editore.
- Condoret, A. (1973/1976), *L'animal compagnon de l'enfant*, Paris: Fleurus
- Corsetti, R. (2003), *Appunti di psicopedagogia del linguaggio e della comunicazione*, Roma: Edizioni Kappa.
- Corsetti, R. (2004), *Indicazioni per l'utilizzo del sistema di analisi del linguaggio*, CHILDES, Roma: Edizioni Kappa.
- Francescato, G. (1970), *Il linguaggio infantile: strutturazione e apprendimento*, Torino: Einaudi

- Giovanardi, C. Gualdo, R. (2003), *Inglese-Italiano – 1 a 1 – tradurre o non tradurre le parole inglesi?*, San Cesario di Lecce: Manni
- Levinson, B. (1972), *Pet and human development*, Springfield, Illinois: Charles C. Thomas Publisher
- Parisi, D. (1977), *Sviluppo del linguaggio e ambiente sociale*, Firenze: la Nuova Italia
- Slobin, D. I. (a cura di) (1985), *The Crosslinguistic Study of Language Acquisition – Volume 1: The Data*, Hillsdale, New Jersey-London: Lawrence Erlbaum Associates.
- Taeschner, T. , Volterra, V. (1986), *Strumenti di analisi per una prima valutazione del linguaggio infantile*, Roma: Bulzoni editore

Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo

Okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof kaj dank'al financa helpo de S-ino Mila van der Horst-Kolinska, Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, Internacia Klubo ESPERANTOTUR en Bydgoszcz kaj SKONPRES eldonis en 5000 ekz-eroj libreton 20-paĝan kun mapoj "Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo". Nun estas la tria eldono de la mapoj sub titolo "Esperanto en la mondo" plurkoloraj en formato A-2 duflanke, do duoble pli grandaj ol antaŭe. La kompleto de libreto kun mapoj estas ricevebla por 5 eŭroj inkluzive de sendokostoj au eĉ por 3 eŭroj kun sendokostoj-se oni mendos samtempe almenaŭ 5 kompletojn.

La mapoj prezentas 203 ŝtatojn, 95 landojn kune 298, kaj Esperanto – kontaktojn en 170 landoj de la mondo. La libretoj kun mapoj certe bone servos en Esperanto edukado por studentoj, turistoj kaj ĉiuj esperantistoj interesitaj pri ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo. La prezo- oferto por libretoj kaj mapoj validos ĝis 31.12.2009 pro kutima altigo de poŝtafrankoj novjare.

Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10
 PL-85-094 BYDGOSZCZ, Pollando
 Tel./fakso: +48 52 3461151, Rete: tur@esperanto.bydgoszcz.eu
 Bankokonto: Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz
 Konto n-ro (IBAN): PL 80 13201117 2034 0100 2000 0001,
 SWIFT kodo POCZPLP4 por Internacia Centro

Partoprenantoj en la ambasadeja Zamenhof-festo

